Al ŝi, filino de la popollerneja rektoro Wilhelm Böhringer, plej kontentige estis priokupiĝi pri infanoj. Tial estis ŝi, kiu, post la oficiala fino de la plurjara lingvo-orientiga instruado realigita de Instituto pri Kibernetiko kune kun Eŭropa Klubo ekde 1975, fariĝis (denove honorofice) la instruistino de la lastaj, spontanee ankoraŭ ekestintaj Paderbornaj grupoj da lernantoj. La Internacian Lingvon ŝi estis kune kun sia familio lerninta 1974 en Helsingør (DK); per ĝi - ankoraŭ ĝis 1989 - ŝi povis partopreni en multaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj en kaj ekster Eŭropo. Tiel ŝia persona amikaro rapide pligrandiĝis kaj distribuiĝis de Norda kaj Suda Ameriko ĝis la Ekstrema Oriento; pro ŝia gastamo ofte sciencistoj, instruistoj kaj artistoj el multaj lingvoregionoj ĝuis en Paderborn horojn stimulajn kaj serenajn. La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, al kies evoluigo Brigitte Frank-Böhringer neoficiale multe kontribuis, alvokis ŝin 1985 en la apartenekategorion de Adjunkto Scienca (ASci) - akcepti pli ŝi modeste rifuzis.

Brigitte Frank-Böhringer war ein liberal gesinnter Mensch, stets hilfsbereit und voll Lebensfreude und Herzlichkeit. Ihre Zuneigung galt vor allem ihren beiden Kindern. Unsere Zeitschrift, bei deren Gründung sie mitgeholfen hatte, war ihr bis zuletzt wie ein drittes Kind. Die gegenwärtige erste Nummer des 31.Jahrgangs konnte sie nicht mehr fertiggestalten. „Für meine Grundlagenstudien müßt nun ihr sorgen" war einer ihrer letzten Wünsche. Ohne sie hätte unsere Zeitschrift, die älteste kybernetische Fachzeitschrift in deutscher Sprache, die verschiedenen - auch wirtschaftlichen - Schwierigkeiten nicht überlebt. Dies verpflichtet uns.

Brigitte Frank-Böhringer estis liberalideana homo, ĉiam helpema kaj plena je vivĝojo kaj bonkoreco. Ŝia inklino direktiĝis unuavice al ŝiaj du infanoj. Nia revuo, al kies fondo ŝi estis helpinta, estis por ŝi ĝis la fino kvazaŭ tria infano. Ŝi ne plu povis finprizorgi ĉi tiun unuan numeron de la 31-a jarvolumo. „Por miaj Grundlagenstudien nun vi devas zorgi" estis lasta peto ŝia. Sen ŝi nia revuo, la plej malnova germanlingva kibernetika fakrevuo, ne estus transvivinta la diversajn - i.a. ekonomiajn - malfacilojn. Tio nin devontigas.

Helmar Frank

- für Schriftleitung, Beirat und ständigen Mitarbeiterkreis

- por la redakcio, konsilantaro kaj daŭra kunlaborantaro

Für Wissenschaftler aus reformeuropäischen und wirtschaftlich vergleichbaren Ländern ist unsere Zeitschrift, die nicht zuletzt wegen des regelmäßigen Abdrucks der offiziellen Mitteilungen der AIS dort sehr gefragt ist, über Bibliotheken oft nicht zugänglich, und ihr privates Abonnement kaum erschwinglich - auch nicht die (dann kostenlose) Erlangung durch Erwerb der Mitgliedschaft im Institut für Kybernetik Berlin e.V. (Jahresbeitrag DM 40,-). Ein wirksamer Beitrag zur Weiterförderung des Lebenswerks der bisherigen geschäftsführenden Schriftleiterin wären einmalige oder gar wiederholte Spenden zur Ermöglichung von Patenschaften hierfür. Das als gemeinnützig anerkannte Institut für Kybernetik Berlin e.V. nimmt mit dieser Zweckbestimmung gegen Spendenbescheinigung dankbar Zuwendungen über sein „Unterkonto bei der AIS Deutschland (Postgirokonto 2051-305; BLZ 25010030 Hannover)" entgegen. Der Überweisungsträger sollte den Vermerk tragen: „Inst.f.Kyb.e.V. / Spende wg. Brigitte Frank-Böhringer".

Sciencistoj el reformeŭropaj kaj ekonomie similstataj landoj ofte havas malfacilojn trovi en biblioteko nian revuon - kiu pro la regula publikigado de la oficialaj sciigoj de AIS tie estas aparte aprezata. Privata abono estas por tiuj sciencistoj apenaŭ pagebla - eĉ ne la (tiam senpaga) akiro per membriĝo al Institut für Kybernetik Berlin e.V, (jarkotizo: 40,- DM). Efika kontribuo al la daŭrigo de la vivlaboraĵo de la ĝisnuna deĵoranta redaktorino estus unufojaj aŭ ripetaj donacoj celantaj patronabonojn. La komunutila Institut für Kybernetik Berlin e.V. danke akceptas (havigante donackvitancojn) donacojn ligitajn al tiu celo. Oni ĝiru per la „Subkonto ĉe AIS Deutschland (postgirokonto 2051-305; bankkodo 25010030 Hannover)" kun la indiko: „Inst.f.Kyb.e.V. / donaco pro Brigitte Frank-Böhringer".

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Prezidanta Sekretariejo: KleinenbergerWeg 16A, D - 4790 Paderborn, Tel. (0049-/0-)5251-64200 O
Subtena Sektoro: p.a. ADoc. Dr. Lothar WEESER-KRELL, HerbramerWeg 9, D - 4790 Paderborn

Finredaktita: 1990-03-19/1689 pfR *Redakcia respondeco: OProf.Dr.H.Frank*

Protokolo de la 13-a kunsido de la Senato

(la 7-a post la oficialiĝo de AIS) okazinta de dimanĉo, 1990-02-18/1689 pfR, ĝis sabato, 1990-02-24/1689pfR en apartamento de la AIS-filio Bialystok (asistanta domo de la Teknika Universitato Bialystok) (PL) kadre de la 3-a pola studadsesio de AIS (provsesio por SUS 8) dum la jenaj tempointervaloj: dimanĉon 12:00 h - 13:25 h, 16:00 h - 18.00 h, 20:00 h - 23.00 h; ĵaŭdon 11:15 h - 13:00 h, 15:30 h - 16:00 h; sabaton 16:30 h - 18:00 h, 20:00 h - 22:00 h.

1. (Formalaĵoj. Superrigarda raporto)

La senatanoj OProf Frank, Pennacchietti, Popovic kaj Schick ĉeestis; bonorde ricevis la inviton sed ne povis veni ankaŭ la tri aliaj senatanoj (OProf Chen, Muzic, Pancer). Pri la kvorumo ne estis dubo.

Oni akceptis la protokolon de la 12a kunsido kaj la kutiman tagordon.

Kunlaborinterkonsento inter la Teknika Universitato Bialystok unuflanke kaj AIS aliflanke estis ILe finverkita en Berlin 1989-11-19 pro antaŭa rajtigo fare de la pola ministro pri nacia klerigado kun dato 1989-11-14; en la ĉeesto de la televido subskribis la rektoro de la Teknika Universitato kaj la prezidanto de AIS la per pola traduko kompletigitan kontrakton la 1-an de decembro kaj samtage proklamis ĝin en la ĉeesto de la minstro (Prof.Dr. Samsonowicz, universitato Warszawa) okaze de la solenaĵo pro la 40-jariĝo de la Teknika Universitato. Surbaze de ĉi tiu kontrakto (dulingve publikigita en grkg/Humankybernetik 30/4, 1989, p. 174-176) ekde nun eblas realigi ankaŭ en Bialystok SUS kun finaj ekzamenoj dokumentitaj en aparta registro analoga al tiu en San Marino.

Per letero al la prezidanto de AIS kun dato 1989-11-17 la ministro estis bonveniginta la proponitan kaj kun la Teknika Universitato interkonsentitan ĉikonceman kunlaboron. AIS akiris en la ĉefkonstruaĵo de la Teknika Universitato por sia unua filio buroon proksima al la rektorejo. - Kroma interkonsento kun la urbo Bialystok ebligos la starigon de akademidomo. Ankaŭ el San Marino intertempe venis konkretaj ofertoj por la tiea centra akademidomo. Pri la akademidomoj broŝureto estas havebla je 0,02 AKU. - El San Marino ne venis kontraŭdiro kontraŭ la peto permesi la oficialan uzadon de la muzikinstituto kiel provizora sidejo kaj indiki tion per ekstera ŝildo.

La Centra Oficejo por Eksterlandaj Klerigadoj de la Kulturministroj de FRGermanio (Bonn) estis kreinta subkomitaton kiu en decembro pritraktis la finekzamenojn de AIS kompare al egalnivelaj ekzamenoj en FRGermanio. La reprezentantoj de la landoj reprezentitaj en la subkomitato (Nordrhein-Westfalen ne partoprenis) opiniis, ke laŭ formalaj kriterioj starigitaj 1977 kaj 1985 momente ankoraŭ ne rekomendindas doni la permeson al germanaj civitanoj aktive uzadi sur la tereno de FRGermanio siajn sciencistajn gradojn akiritajn ĉe AIS. (Tiu formala permeso estas en FRGermanio - aliel ol en DDR - ankoraŭ bezonata pro daŭra aplikado de leĝo konforme al la ideologio de la 3-a Regno promulgita la 7-an de junio 1939.) Pro la limigita kompetenteco de la subkomitato kaj pro la federacia strukturo de FRGermanio la opiniesprimo (kiu malkonformas al jura ekspertizo verkita de Prof.Dr. S. Gronemeyer jam 18.03.1987 por ADoc Dr.Dr.h.c.G.Klemm SMdAIS) ne estas deviga por la kompetentaj landaj ministerioj. Tamen probable ĉi tiuj dum la unuopa pritrakto de permespetoj normale emos decidi konforme al la malrekomendo - aŭ prefere prokrasti la decidon. La Centra Oficejo por Eksterlandaj Klerigadoj mem kuraĝigis nin per letero de 23.01.1990 daŭrigi nian laboron kaj raporti de tempo al tempo pri pluaj progresoj ebligantaj novan pritrakton. Ekzemple la interkonsento subskribita kun la Teknika Universitato de Bialystok ankoraŭ ne estis bazo de la pritrakto de la subkomitato. - Kvankam la situacio en FRGermanio estas escepto kiu ne eblus en la plejmulto de la landoj de la mondo, plurmaniera reago rekomendindas: (1) pli perfekte kaj pli amplekse daŭrigi la ĝisnunan laboron precipe en la instruado, ekzamenado kaj realigado de konkretaj sidejo kaj filioj, sed samtempe (2) pli memfide-intense

substreki la internaciecon, interlingvecon kaj oftan interfakecon kiel superecon de AIS kompare al naciaj universitatoj kaj (3) pli konsekvence zorgi pri la (ankaŭ en FRGermanio ne malpermesebla) pasiva uzado de la sciencistaj gradoj per konstanta, precipe publika uzado de la ne mem (sed de aliuloj) ĉe AIS akiritaj gradoj.

OProf Pennacchietti ekde nun estas direktoro de la ekzamenoficejo. OProf Pancer meritas nian dankon pro la plurjara, efika plenumo de la tasko. Serĉata estas efektiva membro de la humanistika sekcio kiu ĝin reprezentu en la ekzamenoficejo.

Ankoraŭ mankas kompare al la postuloj kaj konstatoj de la pasinta senatkunsido: (1) aparta formularo por kandidatletero en la kazo de origina kandidatiĝo, (2) informo el RSM (de advokato Busignani) pri la stato kaj situo de la protokollibro de la Generala Asembleo, (3) subskribitaj interkonsentoj kun ISAE kaj kun Akademio Comenius pri eventualaj estontaj kunfandiĝoj, (4) sekcikoncernaj ISD-eltiroj por la dekanoj kun stato de la unua kvartalo 1990, (5) plenumo de la interkonsento kun FOKUSO pri la diskonigo de la SUS-prelegoj kaj (6) la enirigo de la deciditaj sumetoj (parte) kovrantaj elspezojn 1989 en la servobonhavojn de la senatanoj kaj aliaj roluloj.

Aliflanke realiĝis: (1) aldone al la registro en RSM klarigo (kunsubskribita de Venturini) pri la mallongigoj de la sciencistaj gradoj, (2) apero de la unua volumo de la ACTA SANMARINENSIA ACADEMIAE SCIENTIARUM INTERNATIONALIS (jarfine 1989 pro redakcia iniciato de ASci Brigitte Frank-Böhringer), (3) leteroj al UNESKO kaj al la prezidanto de USSR, (4) produktado kaj disvastigo de gluŝildoj de AIS, (5) anoncoj de prelegoj en ILo por "8th International Congress of Cybernetics and Systems" New York 1990-06-11/15 (ADoc Maxwell, OProf Minnaja, OProf Frank) kaj (6) dua propono por la kondiĉoj por ekzameno anstataŭanta la sanmarinan maturecekzamenon cele studentiĝon ĉe AIS (OProf Schick).

2. (Agadkampo Honorigoj)

Oni aprobis la proponon de OProf Pennacchietti, dekano de la humanistika sekcio, tien alvoki almenaŭ kiel AProf (se ekzistas la necesaj 3 sciencaj publikaĵoj en ILo de li: eĉ kiel OProf) profesoron Furio GABRIELLI, Geneve.

La prezidanto alvoku la jenajn partoprenantojn de la nuna 3-a pola studadsesio (provsesio) kiel ASci al AIS: s-inojn T. Rudakova dr. (SU), Mag. D. Tyblewska-Kundzicz (PL), Mag. Ewa Gorzka (PL), Mag. A. Bernatowicz (PL), kaj s-rojn Miŝurov dr. (SU), Parzyszek (PL), Sielaff (D), Medvedev dr. (SU), Gudskov dr. (SU), Brozi dr. (PL), Galor dr. (PL), Sudolf dr.habil (PL), Zieba dr. (PL). Cele alvokon la prezidanto alskribu la sinjorojn Kryszak dr.habil. kaj Proszek mag. de la universitato de Torun (PL), kiuj ankoraŭ ne ISKaniĝis.

Kiel ADoc estu tuj alvokata Hans Eichhorn mr dr.sc.med. (DDR) kun la instigo dum SUS 7 aŭ SUS 8 akiri la plenajn docentajn rajtojn laŭ la mallongita proceduro en la fako psikiatrio.

Profesoro Pere JULIA m.a., ph.d. (E) ricevu invitleteron al debutprelego dum SUS ek de kies komenco li fariĝu profesoro de AIS.

La senato deziras la laŭeble baldaŭan alvokon de ASci Dr. Harm (D) kaj s-ron Maucher (D) kiel docentoj. La prezidanto instigu ilin en persona interparolado plenumi la laŭregulajn kondiĉojn.

Por ebligi pli larĝskalan kaj rapidan evoluon de la Arta Sektoro oni decidis havigi al ĝi kiel personan bazon grupiĝon nomotan "Internacia Arta Kolegio" (IAK), kiu ludu por la ArS rolon kiel ISK por la SciS. Krom Prof. Schulz (D) - la ĝis nun sola membro de la ArS - apartenu al IAK la jenaj artistoj kiuj jam kontribuis al SUS aŭ al la nuna provsesio en Bialystok: la gekantistoj Ĵak le Puil (F), Nikolin' (B) kaj Handzlik (PL), la pentristino kaj teksaĵartistino Tamara Roszak (PL) kaj la aktorino Barbara Lukaszewska (PL). La prezidanto skribos koncernan leteron al ili kiun laŭeble kunsubskribu Prof. Schulz en sia kvalito de inaŭgurinto de la ArS.

3. (Agadkampo Instruado kaj Ekzamenado)

La komitato por la starigo de regularo pri enirekzameno egalvalora al la sanmarina maturecekzemeno por studadkandidatoj sen alia egalvalora dokumento - decidita jam dum la 12-a senatkunsido - konsistu el OProf Schick (D), OProf Dr. Frank (D), ASci Mag. J. Lewoc (PL), OProf. Muzic (YU) kaj ADoc Weeser-Krell (D). La komitatestro estu OProf Schick, kiu jam en la novembro 1989 verkis diskutbazon alternativan al propono de OProf Frank. Ambaŭ tekstoj estu distribuataj al la komitatanoj cele starigon de regularo proponenda al la senato kaj al la Generala Asembleo en la septembro 1990.

Finekzamenoj ĉe AIS estonte eblos dum SUS krom centre en San Marino analoge ankaŭ en la nordorienteŭropa AIS-filio Bialystok. La tie agnoskitaj sciencistaj gradoj troviĝos en registro analoga al tiu de San Marino, konservota por la ministerio provizore fare de la Teknika Universitato. La dato de la dokumento estu la sama kiel tiu de la atesto, nome la dato de la fina ekzameno, sed nur la atesto, ne jam la dokumento eniru tuj en la manon de la kandidato

sukcesinta la finan ekzamenon - la dokumento mem nur post (a) enregistrigo kaj (b) plenumo (dum maksimume 24 monatoj!) de eventualaj restaj laŭregularaj devoj; per asterisko (*) oni kodigos en la registro la finan konstaton, ke ĉiuj devoj estas plenumitaj kaj la dokumento transdonita. La samon oni estonte faru en San Marino. Se pli ol du jaroj post la registrita dato de la fina ekzameno ankoraŭ mankas la fina konstato la dokumento estu nuligata kaj la ĝis nun provizora (senasteriska) enregistrigo senvalidiĝas.

La sciencistaj gradoj jam registritaj en San Marino estas laŭdezire krome registreblaj en la polan registron, se la koncerna scienculo (prefere dum tiea studadsesio de AIS) persone montras al la kompetenta oficisto de la Teknika Universitato Bialystok la originalojn de siaj (1) atesto, (2) dokumento kun notaria aserto de ĝia registriteco en San Marino kaj (3) atestaro kun fina konstato. (La inversa eblo estas celita por San Marino.) Laŭ la interkonsento de 1989-11-19/12-01 la unuopa scienculo, kies sciencista grado estas registrita en la pola AIS-registro, povas laŭdezire krome ricevi de la Teknika Universitato (aŭ eventuale estonte de alia pola universitateca klerigejo aliĝinta al la interkonsento) personan agnoskodokumenton, kiu certigas la rajton je aktiva uzado de la originala (latinforma) AIS-grado en Pollando kaj la (ne necese uzendan) eblon krome akiri en Pollando samrangan polan titolon. La proceduro de tia eventuala "adapta adopto" flanke de pola universitateca klerigejo probable reduktiĝos al la kontrolo de la scienca laboraĵo kaj de la pola agnoskodokumento - kaj al posta fina kolokvo en la pola lingvo aŭ en antaŭe interkonsentenda oficiala lingvo de AIS.

4. (Agadkampo Sciencaj Konferencoj)

Pro privata obstaklo la prezidanto ne povos sekvi la inviton de ASci SHEN Chenru al persona, oficiala partopreno de ILa studadsesio de Ac-demia Sinica en Pekino 1990-05-25/30. Ne montriĝis eblo de partopreno de alia ĉeestinta senatano. Kun ĝojo la senato akceptas la pretecon de ASci Sielaff (D) tien vojaĝi reprezentonte la eksterĉinajn AISanojn; oni supozas, ke OProf CHEN Yuan povos reprezenti la senaton.

Pro manko de pli precizaj informoj pri la kondiĉoj kaj perspektivoj oni ne povis pritrakti la eblojn de oficiala partopreno de AIS en studadsesioj de la pedagogia unversitato Flensburg (D) 1990-07-22/28 kaj de la universitato Debrecen (H) en la aŭgusto. La prezidanto daŭrigos siajn interkonsiliĝojn.

OProf. Carlo Minnaja (p.a. Instituo pri aplikata matematiko de la Universitato I-35131 Padova) preparis kaj diskonigis antaŭkonferencon al SUS 7 en la universitato Padova 1990-08-30/31 kaj ankoraŭ akceptas prelegofertojn.

Kadre de la programo de la oficialaj (kernaj) SUS 7 en San Marino 1990-09-02/09 kaj (definitive aprobita:) SUS 8 en Bialystok 1990-09-16/23 okazos kursoj kaj prelegserioj nur konforme al art. 6.2 de la provizora regularo pri la instruado kaj studado, t.e. fare aŭ kunordigite de efektivaj membroj kaj (plejgrandparte) en ILo. Eblas aldoni kursojn de AdAIS aŭ de sciencistoj speciale invititaj de la koncerna dekano same kiel kursojn en (la loke aŭ ĉe AIS) oficiala etna lingvo kiel antaŭ- aŭ postkursojn (1-a/2-a aŭ 10-a/11-a aŭ 14-a/16-a aŭ 24-a/25-a de septembro); ili validas laŭ art. 7.2 de la studadregularo, t.e. ne kiel SUS-kursoj en la senco de la artikolo 8.4. Kiel antaŭkursoj precipe estas celitaj lingvokursoj (de kiuj por finekzameno maksimume 1 studunuo validas kiel SUS-studunuo laŭ la regularo). Proponoj iru (samtempe kun kopio al la prezidanta sekretariejo) al la koncernaj dekanoj kiuj bonvolu finstarigi siajn sekciprogramojn antaŭ la fino de la monato aprilo por ke la programoj de SUS 7 kaj SUS 8 estu haveblaj ekde la junio 1990.

La oferto de TAKIS SMdAIS, akcepti almenaŭ unu kurson aŭ eventuale tutan studadsesion (t.e. minimume 3 kursojn) por la aranĝoj de INTERKIBERNETIK'90 inter SUS 7 kaj SUS 8 en Poprad (CS), estas akceptinda pro la tre favoraj financaj kondiĉoj. Oni celu la realigon de 8-hora AIS-kurso pri interlingvistiko; por garantii la nivelon estas dezirinde, ke la kurson akazigu OProf Janton (F) aŭ AProf Schulz (D) aŭ ADoc Dr. Carlevaro (CH) aŭ ADoc Duc Goninaz (F) aŭ ADoc Mag. Yashovardhan (IND). La prezidanto proponu tion al la menciitaj kompetentaj AISanoj. Eventuale ADoc Maxwell anstataŭe povus realigi komputil-interlingvistikan kurson surbaze de la DLT-projekto.

Kun ŝoko la senato eksciis dum sia kunsidsemajno pri la morto de OProf Paul ARISTE MdAIS en la januaro 1990. Ne plu estas nun certa, ĉu la planita 2-a konferenco pri interlingvistiko de la universitato de Tartu, planita sub la prezidanteco de la mortinto, povos okazi post SUS 8 kun oficiala partopreno de la humanistika sekcio de AIS.

Oni finaprobis la okazigon de unua rusa AIS-sesio dediĉita al la "Jaro de la rusa kulturo - 1991" 1991-12-26/1992-01-05 kun kursoj kaj konferencoj pri la tri temaroj "Lingvo - Kulturo - Ekologio" en Moskvo kaj Leningrad laŭ la propono de ADoc S. Kuznecov prof.dr.habil. kaj de ASci L. Medvedev dr. La prezidanto subskribis interkonsenton pri la tiucela kunlaboro

kun la Internacia Kunordiga Komitato de Interlingvistoj (IKKI), la Internacia Scienc-Produktada Unuiĝo "Konkordo" (ISPU) kaj la Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU). Oni elektis senatanon OProf Schick pro sia kroma kvalito de prezidanto de Eŭropa Klubo kiel reprezentanton de la senato de AIS por ĉi tiu kunlaboro. Krome plenumos la taskojn de AIS por la realigo de la sesio (kies malfermo okazos en la universitato de Moskvo) rusa AIS-komitato legitimita de la senato. Ĝi estu gvidota de ADoc S.N. Kuznecov (kunordiganto de la scienca programo kaj senpera prizorganto de la lingvistika programparto) kaj ASci L. Medvedev (ekologo kiu kunordigos la organizan laboron). Al la komitato krome apartenu por la scienca programo la ekologo A.D.Armand dr. ISK kaj la kultursciencisto V.P. Grigorjev dr. ISK, por la organiza laboro V.K. Gromov dr. ISK (arta kaj turisma kadra programo, memoraĵproduktado) kaj ASci. Tatjana RUDAKOVA dr. (sekretario).

5. (Agadkampo Publikigado)

Oni eksciis, ke nur post la limdato fiksita laŭ deziro de la naturscienca sekcio alvenis por la "aktoj de SUS" (ACTA SANMARINENSIA ACADEMIAE SCIENTIARUM INTERNATIONALIS) la presoriginaloj de ADoc Angstl kaj de PDoc Szabo; ADoc Dr. Bormann estis jam por SUS 6 mem presinta sian kurstekston. Oni antaŭvidu tiujn tekstojn por la dua volumo.

ADoc Kuznecov prof.dr.habil. intencas prepari la publikigon de la resumaro por la unua rusa AIS-sesio ĝis la aŭtuno 1991 kaj de la kompletaj tekstoj ĝis la aŭtuno 1992.

6. (Agadkampo Kunlaborprojektoj)

La senato ĉeestis dum 1a kunsidsemajno la Akademian Forumon merkredon 1990-02-21, kiu ekdiskutis ekologiajn rekomendojn. La senatanoj Frank kaj Popovic insistis ke AIS ne sekvu la kutiman ekzemplon de la nuntempe reganta ekologio preteratenti la gravecon de kulturekologio. La Forumo fine aprobis la decidon de la senato lanĉi dum SUS 8 interfakan kunlaborprojekton "Evoluigo de mediologio kiel tria, ĝeneraliga ŝtupo de la ekologio".

La senato ĉirilate ankaŭ eksciis pri la rezultoj de kunveno organizita de ASci Dr.G. Lobin (D) kun polaj instruistinoj instruantaj ILon en elementaj lernejoj de Bialystok kaj de preparkunveno organizita de OProf Schick (D) cele fondon de reformeŭropa alo de Eŭropa Klubo: dum SUS 8 okazos (1) kunsido pri eventuala transformo de la elementlerneja ILo-instruado en lingvo-orientigan instruadon kiel kernan parton de eŭropa edukado kaj (2) redakcia kunsido cele adapton de la Eŭropa Kalendaro de Eŭropa Klubo - siatempe evoluita kiel lernilo por la lingvo-orientiga instruado - al la reformeŭropaj landoj kaj lingvoj. Oni observos la evoluon de ĉi tiuj iniciatoj el kiuj eventuale kreskos internacia kunlaborprojekto kunordigebla de AIS.

7. (Agadkampo Organiza Stabiligo)

La senato aprobas la decidon de la estraro de la Subtena Sektoro (farita 1990-01-24/1689 pfR) adapti la buĝetan jaron de la SubS al tiu de la SciS. Necesas aprobo fare de la Ĝenerala Asembleo post la ferma solenaĵo de SUS 7 (1990-09-09 en San Marino) aŭ de SUS 8 (1990-09-23 en Bialystok) per ŝanĝo de artikolo 18 de la statut-apendico. Se la Asembleo de la SubS tion aprobos dum sia kunveno antaŭ la inaŭguro de SUS 7 en San Marino 1990-09-02 (aŭ plej malfrue dum sia kunveno antaŭ la inaŭguro de SUS 8 en Bialystok 1990-09-16) la nuna buĝeta jaro de la SubS, t.e. 1689, povos daŭri pro la decidota ŝanĝo ĝis la 31-a de decembro 1990/1690pfR, kaj la sekvanta buĝeta jaro estos 1991.

La senato konstatas malklarecon pri la propra deĵortempo, kiu komenciĝis 1987-05-02/1687pfR kiam la senato reelektiĝis tuj post la oficialigo de la akademio: la senato devas ofici kvar jarojn laŭ statut-artikolo 10, kaj la artikolo 26 postulas fini la financan jaron la 31-an de decembro. Oni samopiniis, ke deĵortempo de senato normale finiĝu je la fino de financa jaro. Tio nur eblas, se oni interpretas artikolon 10 tiel, ke la senato oficu aŭ "dum kvar (kompletaj) kalendaraj jaroj" (kio signifus, ke la unua senato deĵoru - krom dum la komencaj 8 monatoj - dum la kvar kalendaraj jaroj 1988-1991), aŭ "en kvar kalendaraj jaroj" (t.e. de la 2a de majo 1987 ĝis la 31-a de decembro 1990). La senato pretas oferti la unuan interpreton al la Ĝenerala Asembleo. Se ĝi akceptos la oferton, la senato proponos alekton de 1 aŭ 2 kromaj senatanoj por la resta deĵortempo, depende de tio, ĉu OProf Kawamura, alelektita jam 1988, estos akceptinta la alelekton aŭ ne. OProf Popovic proponos alelekti OProf Peevski. - Se la ĜA decidos limigi la deĵortempon de la unua senato post la oficialigo de AIS al la fino de la nuna jaro okazu la elekto de nova senato dum SUS 7 aŭ plej malfrue dum SUS 8.

La Senato konstatas ke (1) pro la publikigo de la protokolo de sia 12a kunsido en la septembro 1989 kaj (2) pro la artikoloj 5 kaj 9 de la provizora regularo pri instruado kaj studado kaj (3) pro la publikigo de ĉi tiu protokolo enhavanta la suprajn detalojn pri la tagoj kaj

tagordoj de la Asembleo de la SubS kaj de la Ĝenerala Asembleo estas plenumitaj la laŭregularaj preskriboj pri la invitoj.

La dekano de la universitateca instituto Sibiu/Hermannstadt (RO), kie la nuna rumania vicministro pri klerigado estas profesoro, proponas kunlaboradon kun AIS kun interŝanĝo de profesoroj kaj studentoj. La senato ankaŭ en tiu kazo substrekas sian opinion, ke antaŭkondiĉo nepre devas esti akiri similajn agnoskon de AIS kaj legitimecon de ĝia laboro kiel en RSM kaj nun en Pollando.

La senato aprobas havigi el la buĝetero "akademidomoj" 50 AKU kiel komencan subvencion al la nordorienteŭropa filio Bialystok kaj dankas pro la preteco de la SubS-estraro (laŭ decido de 1990-01-24/1698pfR) havigi por la dua duono de la jaro la saman sumon, de kiu anticipe estis havigataj 10 AKU por investi en jam aperintan paralelan eldonon de la AIS-broŝuro en la lingvoj ILo, pola kaj rusa. - La restaj 35 AKU el la buĝetero ebligu financekspertizon pri la akademidomoj kiel bazon de fondota kompanio. Oni danke akceptas la pre pretecon de ASci Sielaff (laŭeble kune kun S-ino I. Klemm SMdAIS) reprezenti niajn interesojn vid-al-vide la ekspertiziston kaj poste kunordigi la jure necesajn fono-aktivecojn.

Por malfermi konton en Bialystok la tiea AIS-filio bezonas juran memstarecon. Tiucele estu kreota "AIS Pollando" laŭ la modelo de "AIS Deutschland" dum SUS 8. Intertempe gvidos la filion AProf.Dr.habil. Tyblewski (senpere respondeca por la scienca agado) kaj ASci Parzyszek (kiu en interkonsento kun AProf Tyblewski - kaj en ties foresto memstare - zorgu pri la lokaj organizaj problemoj).

La senato malakceptis por SUS 8 fiksi AKU-valoron en polaj zlotoj laŭ ne oficiala kurzo valida nur por partoprenantoj el reformeŭropaj landoj. Por transirtempo tamen la senato aprobas la proponon de la AIS-filio, ke partoprenantoj el Pollando kaj aliaj landoj en komparebla ekonomia situacio ricevu (jaron post jaro malpligrandiĝantan) rabaton je (komence) 80% (1) de la kurskotizoj, (2) de la necesaj ekzamenkotizoj kaj (3) de la restadkostoj (loĝado kaj manĝado en la Teknika Universitato) por SUS 8 kaj estontaj AIS-sesioj en Bialystok, kondiĉe ke ĉiuj aliaj aliĝantoj ricevos la duonan rabaton (do komence 40%n) de la restadkostoj (aŭ, se tion la Teknika Universitato preferas kaj se oni volas riski malpli grandan partoprenantaron: ankaŭ la docentoj ricevu la plenan rabaton kaj neniu ricevu la duonan).

Por SUS 8 la rabato validas kaze de valida aliĝo - t.e. kun antaŭpago (aŭ dekalkuleblo de la servobonhavo) - antaŭ la fino de julio 1990. Aliĝantoj pagantaj je 40%a rabato pagu ĝis tiam 1,4 AKU (140,-- DM) por la restadkostoj en plej modesta kategorio (por la plej luksa: 2,45 AKU) - kaj krome la aliĝkotizon (ĝis tiu limdato: 0,3 AKU, poste: 0,5 AKU) same valida por ĉiuj.

OProf Pennacchietti starigos pripersonan informilon por artistoj. Kondiĉo ke ili estu akceptataj por la Internacia Arta Kolegio (IAK) estas (1) komunikadkapablo en ILo sufiĉa almenaŭ por korespondado kaj (2) minimume 2 jarojn da arta kreado eĉ eksterprofesia.

Pro instigo de OProf Weltner s-inoj G. Sammaritani SMdAIS (RSM) kaj Tamara Roszak (PL) kreis novajn modelojn de la akademia vestaĵo. Vidinte jam la modelon de s-ino Roszak la senato inklinas al modelo havanta (kiel ĝis nun) manikojn.

8. (Agadkampo Rekomendoj de AIS)

Laŭ la peto de la senato AProf.Dr.habil. Tyblewski gvidis la Forumon dum la 3-a pola sesio de AIS ("provsesio", "ekologia sesio").

9. (Diversaĵoj)

Dum la ferma solenaĵo oni danku al la rektoro kaj la vicrektoroj de la Teknika Universitato same kiel al ĉiuj lokaj apogantoj pro la sukcesigo de la sesio.

La senato aparte dankas al la vicministro pri nacia klerigado de Pollando, docento Janusz GRZELAK, pro la persona partopreno kaj parolado dum la solena komuna kunsido de la senatoj de la Teknika Universitato kaj de AIS kun delegitoj de pluraj polaj universitatecaj klerigejoj ĵaŭdon 1990-09-22; la pola televido sendis eltranĉojn de ĉi tiu solenaĵo dum sia ĉefa novaĵelsendo.

La 14a senatkunsido okazos dum SUS 7 en San Marino, la 15a jam dum SUS 8 en Bialystok. Necesas zorgi pri la kvorumo - t.e. minimume 4 (post alelektro: minimume 5) senatanoj devas persone ĉeesti.

Protokolis: OProf.Dr. H. Frank
Prezidanto

Protokolo de la kunsido de la germana parto de la estraro de la Subtena Sektoro

okazinta la 24-an de januaro 1990, en la prezidanta sekretariejo en Paderborn.

Ĉeestis: Direktoro ADoc. Dr. L. WEESER-KRELL, ADoc. Dr. Dr.h.c. G. KLEMM kaj Ines Ute FRANK, kiu protokolis.

Oni faris la jenajn decidojn:

1. Unuanime la subteno de la filio en Bialystok por la dua duono de 1990 (50 AKU = 5000,— DM) estis aprobita. Vicdirektoro OProf. M. GREGO dott. skribe subtenis la aprobon.

2. Oni proponis adapti la buĝetan jaron de la Subtena Sektoro al tiu de la Scienca Sektoro, tio signifas ŝanĝon de la punkto 18 de la Apendico de la Statuto. La buĝeta jaro de la Subtena Sektoro ekde 1991 komenciĝos per januaro, do la jaro 1689 daŭras de septembro 1989 ĝis decembro 1990, kaj la nombrado de la jaroj laŭ la sanmarina kalendaro forfalos.

3. S-ro Eichholz, subtena membro iama, sendis ĉekon pri 1000,— DM kiel donacon. Oni opinias pagi de tio la ŝuldojn (membrokotizo) de li (por tri jaroj inkluzive 1990), kaj doni pri la resto (700,— DM) donackvitancon.

Ĝustigo:

La senatprotokolo publikigita en grkg/H. 30/3 estas jene korektenda:

„... *La senato aprobis la alvokon aŭ rangoplialtigon de la jenaj ISKanoj kaj petis la prezidanton prizorgi la formalaĵojn: La sep ĝisnunaj AProf Grego (sekcio 6), Jordan (s. 2), Maitzen (s. 5), Meszaros (s.5), Minnaja (s. 3), Quednau (s. 5) kaj Sachs (S. 5) fariĝu plenrajtaj membroj (OProf). ...*"

Okazaĵoj realigotaj senpere de AIS aŭ kunlabore kun ĝi:

* *AIS-Konferenco.* Fine de aŭgusto - 1990.08. 30/31 - en Padova (I) okazos simpozio kiel scienca antaŭkonferenco al SUS 7. La prelegoj (po maksimume 20 minutoj) estos en la oficialaj lingvoj de AIS kun ILo kiel ĉeflaborlingvo. Oni konferencos en la Universitato de Padova, Palaco Liviano (Fakultato pri Beletro). Ĝis nun enprogramitaj estas prelegoj pri informadiko, lingvokibernetiko, lingvaj kaj kulturaj problemoj. Pliaj detaloj sekvos venontnumere. Partoprenkotizo ne ekzistas. Limdato por preleganonco (per unufolia resumo) : 1990.04.30 al la organizanto: OProf. Carlo MINNAJA, Dip. di Matematica, Via Belzoni 7, I-35131 Padova. Sciigon pri akcepto aŭ rifuzo la sendintoj ricevos antaŭ 1990.05.15.

* *SUS 7.* La ĉijara Sanmarina Universitata Sesio okazos 1990.09.01/10 en Borgo Maggiore. Malgraŭ la jam pasinta limdato por akcepti kontribuojn, eblas ankoraŭ anonci koncizprelegojn (20 min.). Detaloj troviĝas en la Unua bulteno havebla de la Prezidanta Sekretariejo. - Atentu kandidatoj: limdato por kandidatiĝi sen pagi malfruiĝkotizon estas 1990.03.31!

* *TAKIS-Konferenco INTERKIBERNETIK'90.* En la kadra programo AIS okazigos kursojn pri interlingvistiko kaj pri fungoj (po 1 studunuo). Unuaj detaloj jam aperis en grkg/H. 4/1989.

* *SUS 8.* La kvara pola sesio de AIS okazos 1990.09.14/25 en la unua filio de AIS, t.e. en Bialystok (PL), Teknika Universitato, ul. Wiejska 45 A (PL-15-351 Bialystok). Pri aliĝmaniero, loĝebloj, kostoj kaj rabatoj informas la Unua Bulteno. Oni respektu la limdatojn por ĝui la tre malaltajn prezojn! Kandidatoj atentu, ke limdato por kandidatiĝie sen pagi malfruiĝkotizon estas 1990.04.15.

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo
(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,
(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj
(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 3-a pola studadsesio de AIS inaŭguranta la AIS-filion en Bialystok

la akademian gradon

(2.2) „Magister scientiarum humanarum (Mag.sc.hum.)“ - t.e. magistro pri humanistiko -

al

Alicja BERNATOWICZ el Szklarska Poręba (PL) *1937-01-01 en Mołodeczno (PL/SU), en la fako „literaturscienco“ (dokumento 1689 M 001)

Destina TYBLEWSKA-KUNDZICZ el Gdańsk (PL), *1961-09-15 en Jelenia Góra (PL), en la fako „psikologio“ (dokumento 1989 M 002)

(2.5) „Magister scientiarum naturalium (Mag.sc.nat.)“ - t.e. magistro pri natursciencoj ;

al

Ewa Maria GORZKA el Łódź (PL), *1960-11-12 en Łódź (PL), en la fako „maŝingardado“ (dokumento 1689 M 003)

(3.2) „Doctor scientiarum humanarum (Dr.sc.hum.)“ - t.e. doktoro pri humanistiko -

al

Mag.sc.cyb. QIAO Yi el Beijing (CHN), *1947-09-21 en Beijing (CHN), en la fako „lingvistiko“ (dokumento 1689 D 001)

Zbigniew GALOR el Swarzędz (PL), *1952-07-16 en Szczecin (PL), en la fako „sociologio“ (dokumento 1689 D 003)

(3.5) „Doctor scientiarum naturalium (Dr.sc.nat.)“ - t.e. dotoro pri natursciencoj -

al

Andrzej BROZI el Łódź (PL), *1955-12-30 en Łódź (PL), en la fako „kemio“ (dokumento 1689 D 002)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1990-02-24 .- Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la polaj universitatecaj klerigejoj aliĝintaj kaj aliĝontaj al la interkonsento de 1989-12-01 subskribita kun aprobo de la ministro pri nacia klerigado de 1989-11-17 la supre surlistigitaj 6 agnoskoj estas enskribitaj en la „REGISTRON de la eksterlandaj kaj polaj apartenantoj al la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies ... internaciaj sciencistaj gradoj kaj titoloj ... estas en la latina lingvo agnoskataj ...“ (numeroj 4 - 9). Sub la numeroj 1 - 3 kaj 10 estas krome registritaj la jam transdonitaj, en la registron ĉe la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo en San Marino enskribitaj dokumentoj 1685 D 008 de Dr.sc.hum. Günter KLEMM, 1685 D 010, de Dr.sc.hum. Günter LOBIN, 1687 D 001 de Dr.sc.nat. Hartwig HARM kaj 1685 D 011 de Dr.sc. hum. Lothar WEESER-KRELL.

Białystok, 1990-02-24/1689pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a“, „b“ usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a“ etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1“ usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild“. – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/ Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers“ dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a“, „b“ ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a“ ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1“ ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon“. – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 –1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.